

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 23-an de majo 2016 je 19.30h per Skajpo.**

Partoprenantoj: Mario Machlik, Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Amelie Matt, Hilde Dahlberg, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Herman Ranæs.

## **0. Tagordo**

Aprobata.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo, la 12-an de majo**

Aprobata kun eta ŝanĝo sub punkto 2.

## **2. Ekonomio**

Skagen Vekst: 48 734 kr (49 234 kr je la 14-a de aprilo).

Skagen Høyrente: 128 907 kr (128 612 kr).

## **3. Jarkalkulo**

La kasisto prezentis la (ankoraŭ ne reviziitan) jarkalkulon. La estraro aprobas publikigadon de ĝi en N.E.

## **4. Jarraporto**

La sekretario prezentis malneton. La estraro decidis ke necesas ĝisdatigi la alineojn pri

- Amaskomunikiloj
- Nombro de abonantoj de Norvega Esperantisto
- Ekonomio
- Kunlaboro kun NEFA

La sekretario dissendu finan version al la estraro por aprobadon antaŭ la 29a de majo.

## **5. Raporto de la revizoro pri la jarkalkuloj 2013, 2014**

Laŭ la protokolo de la Landa Kunveno 2015, la estraro devus publikigi en Norvega Esperantisto la raportojn de la revizoroj por la jarkalkuloj de 2013 kaj 2014, kiam tiuj pretas. Tion ni ankoraŭ ne faris.

La estraro (la kasisto) sendos la revizorajn raportojn al la Oficejo. Ni lasu al la redaktoro decidi, ĉu publikigi la tuton aŭ nur resumon.

## 6. Eventualaĵoj

1. Herman Ranes planas viziti Esperantonion denove por helpi teknike pri la komputilo kaj tiam ankaŭ kontrolos la aspekton de la ejo.
2. DNB kontaktis Amelie Matt, ofertante al NEL Vipps-konton. Amelie respondis, ke ŝi ne povas fari tiun decidon. Sed se ili kontaktos la kasiston, ni petu pliajn informojn, kaj la estraro diskutu, ĉu ĝi estus utila por NEL.
3. La estraro petis al Herman Ranes diri la salutvortojn de NEL dum la UK ĉi-jare. Li akceptis.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2155h.

Dato por la venonta interkonsiliĝo: ĵaŭdo la 18a de aŭgusto..